Kongresa numero 6.

„Mutig vorwärts!“ **Aŭstria** „Kuraĝe antaŭen!“

Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

Abonprezo (komencebla ĉiumonate) por Aŭstrio ŝ 4.60, daŭrebla ankaŭ en partpagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj sv. fr. 3.75; ponumere 45 g (1 resp. kup.).

Aperas la 5. de ĉiu monato. Leteradreso: Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803). Manuskriptojn ni nur resendas kun reafranko. Poŝtŝparkaso-konto D-123.826.

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

Nro 6 (131 en la vico) Korneuburg ĉe Wien, la 5. de junio 1936. 13. jaro

Germana Esperanto-Asocio.

Je multnombra partopreno okazis en Weimar la 25. jarkunveno, kiu restos neforgesebla al ĉiuj.

Pro la ordono de la anstataŭanto de la Gvidanto, kiu malpermesas al la partianoj la anecon al GEA, multaj timis pri la sukceso de la kongreso. Sed ilia opinio estis ĝustigita, ĉar en **unuanima solidareco** la diversaj demandoj estis priparolitaj kaj **ĉiuvoĉe** estis decidita la kontinuado de la Asocio.

S-ro Walther, ricevinte de la partio la specialan permeson, daŭrigi la negocojn de la asocio ĝis la novelekto, metis sian oficon en la manojn de la nove elektita prezidanto, la ĝisnuna afergvidanto, Fritz Thieme-Dresden.

Fine oni honoris la prezidinton Kurt Walther kaj lian edzinon, ofereme kunlaborintan, kaj s-ron lernejan ĉefkonsiliston d-ron fil. Fritz Kraner-Dresden per distingo je la „Arĝenta E.-insigno de GEA“.

La venontjara kongresloko estos Berlin kaj s-ro Deka-Berlin transprenis la preparan taskon. Tuj aliĝis 26 personoj.

Estu al la frata organizo en Aŭstrio permesate, verkore gratuli al la germanaj samideanoj pro ilia rigora konduto kaj pro ilia amo kaj dediĉo al Esperanto, kiuj devigis ilin, alten teni la standardon de Esperanto kaj daŭrigi la laboron por ĝi en Germana Esperanto-Asocio.

Al la nova prezidanto ni deziras plenan sukceson — li transprenis la gvidadon en la plej malfacila periodo de la ekzisto de GEA, kiu jubileis en Weimar. La decido de Weimar estis la plej inda jubilea donaco al GEA sed ankaŭ donaco al la Esperanto-movado tutmonda!

Al prezidinto Kurt Walther, kiu tiel ofereme, modele kaj ekzemplondone gvidis GEA, nian koran dankon!

Vivu GEA, vivu la nova prezidanto, la sukceso estas certa!

Aŭstria E.-Asocio: Steiner.

„Warum Esperanto? Warum Deutscher Esperanto-Bund?“

(Kial Esperanto? Kial Germana Esperanto-Asocio?)

Jen la titolo de germanlingva 20-paĝa broŝuro, bele aranĝita, kiun eldonis GEA je sia destin-horo pro sia jubilea Kongreso en Weimar.

Post belaj enkondukaj vortoj de prezidinto Walther la broŝuro enhavas sub A) jenajn interesajn ĉapitrojn: „La malfacileco de interkompreniĝo inter diverslingvaj homoj“, „Rimedoj kaj vojoj, forigi la malfacilajojn de interkompreniĝo“, „Kiujn ecojn mondhelplingvo, destinita por la interpopola uzado, devas posedi?“, „Ĉiujn postulojn nur Esp. povas kontentigi“, „Esp. estas kiel la gepatra lingvo, skribo, la libro, la gazeto, la telefono, la radiotelefonio, la filmteatro — nur ilo, destinata utili al la homaro“.

Sub B) ĝi donas historian rerigardon pri la tutmonda movado kaj la agado de GEA speciale kaj diras interalie en la finvortoj: „Se oni superrigardas la eksterpolitikajn kaj eksterekonomiajn agad-eblecojn kaj la tiurilatajn agadojn de GEA, oni devus pensi, ke jam nun neniu povus plu nei ĉi tiujn faktojn. Malgraŭ tia agado GEA ankoraŭ devas grave luktadi por sia rekono kaj pro la realigo de siaj celadoj. GEA ne lasos sin senkuraĝigi, ĉar Esperanto ĉiam ĝis nun transvivis ĉiun luktadon kaj fariĝis per tiu interne ankoraŭ pli fortigita. La E.-movado estas kultura movado, destinita servi al ĉiu unuopa popolo same kiel al la tuta homaro. Ĝi deziras kontribui al tio, por ke la popoloj alproksimiĝu. Tio estas la **„interna ideo“** de Esperanto. Sed ĝi ankaŭ deziras esti ilo por intimaj kulturaj rilatoj trans la landajn limojn. Jen la **„pli vasta ideo“** de l'Esperantismo. Ambaŭ celas la bonfarton de la homaro kiel de ĝiaj unuopaj membroj. Jen ĝia **„morala enhavo“!**

Kiel certe neniu popolo, kaj se ĝi ankaŭ estus la plej granda kaj nobla, povus retiriĝi daŭre malantaŭ ĉinajn murojn, sen postresti aliajn popolojn, en la kultura evoluiĝo, kiel certe apud la interesoj de la unuopaj nacioj ĉiam restos tiuj de ĉiunaciaro kaj postulos sian rajton kaj kiel certe kompenso inter ambaŭ, kiu nepre venos, ne povos tuŝi la komunan moralan radikon, el kiu ambaŭ prenas sian plej bonan forton, tiel certe ankaŭ la alta ideo de interpopola helplingvo ĉiam restos vigla kiel ĉiupopola kultur-etika afero ne nur en la homaro entute sed ankaŭ en ĉiu unuopa popolo — malgraŭ ĉiuj kontraŭstaroj — kaj, venu kio devos veni, akiros la venkon, kiel ni ĝin esperas, kaj konservos ĝin je la beno de la homaro kaj de ĉiuj ĝiaj popoloj.“

Momentbildoj el Aŭstrio.

Radio-parolado, la 22-an de majo 1936, de Alfred **Schauhuber.**

Salzburg.

Vi kuŝas multvalora en Aŭstrio,
al perlo en la konko tre simila,
vi urbo de Baroko-harmonio.

L'estecon portas vi seren-trankvila
solene kiel en la procesio
l'ornaton portas episkopo brila.

La lingvon de pasinto vi parolas
dum lingvoj vin ekaŭreolas.

Vi muzikiĝis, kiam vi bel-revis:
vi filon kiel Mozart naski devis.

Linz, la Bruckner-urbo.

El viaj turoj preĝas sonoriloj
ekstaze per la laŭtaj buŝo-rondoj
trans muĝa riverego, griilaj triloj.

Animo sonas per la sonaj ondoj:
l'animo de plej bona el la filoj,
sopira pri resonoj kaj respondoj.

Orgenoj egaj tondre, jen, ekbruas —:
Ja, Dio vivas! Lia graco fluas
abunde kiel pluvo en cisternon.
Ni ne pereos, vivos ni eternon.

Eisenstadt.

La tempo kvietiĝas en la stratoj
de Eisenstadt kaj iĝas patrin-bona,
laŭtigas mildajn dirojn de beatoj.

La loka ĉarmo tie gaje-tone
aŭdiĝas per kantatoj kaj sonatoj,
imagas klare simfonio-sone.

Vi dolĉas, urbo, kie la genio
de Haydn maturiĝis je ario
serena, danka al favora Dio,
en dolĉa urbo-ĥoro de Aŭstrio.

Graz.

Ĝardena urbo, vi, en verda lando,
vi suna, rava ĥejmo de gracioj,
vi gajas kiel ŝerca am-demando.

Vi estas bela — kiel papilioj
koloraj en kolora florgirlando —
en praaj honorindaj tradicioj.

Rivero per rubando hel-arĝenta
la koksojn viajn babilante zonas.

La maljunaĝo ĥejmiĝita sentas
feliĉa pacon, kiun vi fordonas.

Klagenfurt.

Germana urbo pro la propra volo,
gardanta l'drakon de popol-fremdigo,
germana urbo, vi, fidel-idolo.

Kuraĝa urbo, viva pro instigo
el tempoj streĉ-kruelaj sen konsolo,
vi iam „travadeja ekplendigo".

Nuntempe feliĉigas via tago
la gaston tre per viaj belo, amo.

Invitas lin la urbo, Wörtherlago:
de l'Karawankoj fest-ornamo.

Innsbruck.

Fiera pri la aĝa katedralo,
pri l'urb-turo, „ora tegmenteto",
balkonoj belaj, jen kaj jen portalo,
fiera pri l'heroo kaj profeto,
pri Hofer, la popola generalo,
etendas Innsbruck sin en zorga neto.

Montegoj neĝ-arĝentaj l'kapojn levas
pri urbo, kiu viglas kaj ne revas.

Fremduloj multaj, „ponto super Inn",
vizitas vin kaj gloras ĉiam vin.

Bregenz.

Juvelo-ĉeno dense sur la kolo
de virga belulino: Bregenz brilas
ĉe ŝvaba maro en sun-aŭreolo.

La suda dolĉo tie ĉi azilas
en nord-acido, kiam printemp-volo
en arboj flor-ebrie ekoscilas.

Multaĝa ekkonilo, „Martin-turo",
donacas tutan belon de naturo.

Kaj kie belas tiom la arbaro,
la verda katedralo, kaj la maro?

Leo Belmont.

Esperanto kaj Revo.

(Parolado dum la Aŭstria Vespero, okazinta en Varsovio la 24. IV. 1936.)

Aŭstria vespero grandskala en Varsovio, okazis en Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo la 24. 4. en Filharmonio sub la protektorato de la aŭstria ambasadoro ekscelenco Maximilian Ritter von Hoffinger kaj en ĉeesto de legacia kons. Felix von Strautz, konsilisto Rebczynski, familio Zamenhof, multaj reprezentantoj de la aŭstria kolonio, de la pola socio kaj amaso da esperantistoj.

Prez. kons. **Wyszyński** salutis kaj akcentis, ke la vespero estas sole aranĝita por varbi por la 28-a Univ. Kongreso de Esperanto en Wien. Ambasadoro Ekscelenco Ritter von Hoffinger per koraj vortoj invitis al vizito de la kongreso en Wien. Tre interese parolis d-ro Róbin, kunlaborinto de nia Majstro. (La parolado aperos en la julia numero!) Nia famkonata verkisto, ankaŭ kunlaborinto de d-ro Zamenhof, Leo Belmont prelegis jenon:

Ni dankas al la aranĝintoj kaj la kunagintoj tre kore kaj promesas aranĝi Polan Vesperon por propagandi por la Jubilea Kongreso, la 29-a en Varsovio 1937! LKK.

Stranga titolo! — ĉu ne?... Kaj certe la aŭskultantoj mirigite flustras: kion li diros je tiu ĉi temo?... Trankviliĝu: mi ankaŭ... ne sciis.

Sed kiam oni sciigis min, ke pro la 28-a Universala Kongreso de Esp., okazonta en aŭgusto ĉi-jara tie, kie antaŭ 122 jaroj debatis la fama Viena Kongreso, la dankema Varsovio aranĝas koncertan vesperon, kiun honorigos per sia ĉeesto la Ministro de Aŭstrio, s-ro Maximilian Ritter von Hoffinger, kaj kiam oni invitis min partopreni la solenaĵon kaj prelegi — ekbalanciĝis en mia kapo, eksaltis pensoj ĝojige, serĉante temon en ĉielatinga poezio kaj cetera prozo — inter grandiozaj historiaj rememoroj de Vindobona, sur elegantaj kaj gajaj stratoj, sur vivoplena Prater kaj en sorĉa, bele tondita parko de Schönbrunn, inter Hofburg, fiera pro jarcentaj potenco kaj luksо, kaj la katedralo de Sta Stefano, alte leviganta sian gotikan turon, fonto de sanktaj inspiroj, inter ĉefverkoj de kulturo kaj arto de pasintaj epokoj, inter ĉarmo de elegantaj vienaninoj... fine en torentoj de bonega viena kafo, inter amaso da bongustaj blankaj bulketoj, en saŭcoj de famaj vienaj bovidaĵaj kotletoj kaj en aromo de vienaj kolbasetoj — kaj lacigita pro tiuj ĉi pensoj, mi tute ne sciis, kiamaniere mi kunigu kun Esperanto mian „aŭstrian" babiladon.

Mi estis preta rezigni pri la honoro prelegi, sed atendanta ĉe la telefono mian respondon Halina Weinstein obstine konvinkadis min, ke mi ĉiam scipovos diri ion rilate (aŭ senrilate) al aŭstria-esperanta vespero, ĉar — laŭ ŝia opinio — mi posedas la kapablon elpremi originalajn pensojn el eĉ plej banalaj temoj. Do mi diris malkuraĝe: „Bone!... estu..., ‚Esperanto kaj revo'." Kaj nun mi, kompatindulo, estas devigita paroli je tiu ĉi temo, kaj vi, malfeliĉaj aŭskultantoj, donacu al mi kvaronhoron da afabla atento.

*

Poeto Kazimiro Glinski, meditante pri silento de tomboj, ĵetis en belega poemo „En tombejo" profundan penson, ke la grandeco de l'homo estas taksata laŭ liaj revoj, ĉar

„Spirit-fortulo tiajn revojn havas,
Subliman mondon kreas li al si...
Ho, senmorteco! Ankaŭ de l'fortulo
Grandioza, reĝa sonĝo estas vi..."

La grandeco de Ludoviko Zamenhof estas reĝaj sonĝoj, potencaj revoj de l'kreinto de la internacia lingvo Esperanto. Se li kunmetus nur lakonajn gramatikajn formulojn kaj malgrandan facile memoreblan vortaron, kaj deklarus sole: „Mi donas al vi plej facilan lingvon!" — ne ekbatus entuziasme tiom da koroj al lia alvoko. Maldiligentuloj respondus: „Kio cele al ni pli facila lingvo? Estas ja ĉiu peno lerni novajn vortojn kaj regulojn. Sufiĉas al ni babili nian lingvon." Aŭ li respondus: „Ni preferas pli malfacilan lingvon. Estas ja pli elegante paroli france se eĉ kun eraroj. Ni preferas la pretan anglan lingvon; — kiucele al ni nova lingvo? Ĉu por maloftaj vojaĝoj kaj interparoloj kun kelneroj eksterlande?"

Efektive por tiel malgrava celo, kiel ekskursoj al fremdaj landoj, ne uzus Zamenhof sian genion. De post la unua momento, kiam li prenis la plumon por krei novan gramatikon kaj vortaron — lumis al li pli alta celo. Image li ekligis sin kun la biblia legendo pri la malbeno de Babela turo, pri intermikso de lingvoj, kio malhelpis al homoj en komuna eĉ tro fiera laboro — atingi la ĉielon.

Li imagis tiun ĉi felicon alie, li revis pri idealo de tutmonda amo.

...La revoj kunplektis lin kun profetaĵoj ...e Jesajoj kaj Cefanioj pri eterna paco sur ...tero. Venis al li grandioza-aŭdaca penso: ...rigi la kristalajn fontojn de evangelia ...ienco el ŝlimo de multjarcentaj malamoj. ...aj oni povas kuraĝe diri: de tutaj jar-...ntoj ne eksonis pli potence kaj pli pur-...one — sen materialaj profitoj, sen malamo ...iu-ajn homgrupo — la primitiva, apostola, ...rakristana kredo en idealon kunigi naciojn ...e la tuta mondo!

Zamenhof, kreinto de la gramatiko, ...riĝas revulo-poeto, apostolo de la plej ...obla kaj de la plej saĝa pacifismo. Ni ...idas lin, sidanta ĉe skribotablo kun plumo ...n la mano, kaj super lin kliniĝas Anĝelo, ...u diktas al li vortojn de mirinda espero.

En la mondon venis nova sento. Tra la ...ondo iras forta voko. Disportos ĝin ...ntoj ĉiudirekten. Anĝelo trumpetludas — ...veksignalo alvokas homaron ne al glavo, ...al sangaj militoj. Ĝi anoncas pacon al mal-...likaj nacioj. Ĝi alvokas pacajn batalant-...n kuniĝi sub la standardo de l'idealo. ...ntaj muroj, dividintaj naciojn dum mil-...roj, falos sub korbato. Sur fundamento ...interkompreniĝo en unu komuna lin-...vo, la popoloj pleniĝos per Dia penso ...j kreos unu grandan familian rondon. ...sperantaj batalantoj ne laciĝos en sia ...laboro, ĝis kiam la mirinda sonĝo de ...homaro ekbrilos super la mondo kiel ...erna ĉielarko!

La himno, kiun eldiris Zamenhof dum ...Unua Kongreso de Esperanto en Bou-...gne-sur-Mer, eksonis en pli ankoraŭ ...ntencaj vortoj, kiel sublima preĝo pri ...neco de l'homaro.

„Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero."

Kaj tiu ĉi motivo estis kaptita kaj ...kantata centtone en nia juna kaj nobla ...speranta poezio, inklinigante multnaciajn ...gantojn al komuna kredo en pacidealon ... spite al ĉiuj instigoj al malamo, al ...ĝoj de kanonoj, al tondroj de tankoj, ...militа trumpetaro, al krakado de krev-...taj grenadoj, surĵetataj el aeroplanoj sur ...mplenajn urbojn, infanojn kaj virinojn ... ...ite al novtempa „evangelio" de venenaj ...soj!

Revo! — Solena, vestita en ĉefpastran ...staĵon en Zamenhofaj poeziaĵoj, ĝi sonas ...ste petoleme en Kanteto de pastro ...abrowski s. t.:

Kanto". Pastro, esperanta poeto, antaudiras, ke

„Dum venonta la centjaro,
Kredu, esperantistaro,
En Eŭropo, Ameriko,
En Azio kaj Afriko,
Kie ajn vi veturados,
Esperanton ektrovados,
Sur la strato, en vagono,
En hotelo, en salono,
Kaj eĉ en privata domo,
Gin parolos ĉiu homo,
Predikisto, profesoro,
Komercanto kaj doktoro,
Kaj hebreo kaj kristano,
Kaj litovo kaj japano."

Japano! Kaj ĉu tiu ĉi antaŭdiro ĵetita ...r la rimo en ŝerca versaĵo antaŭ pres-...aŭ 40 jaroj ne komencis plenumi sin en ...iaj okuloj? ... En Japanujo ekzistas ja ...ultaj esperantaj rondoj. Mi eĉ malkaŝos ...al vi grandan sekreton: la antikva vorto ...e Samurajoj „harakiri" devenas de Esper-anto. Ĝi signifas harakiri, t. e. akiri harojn. Ho, kiel mi volus fari al mi tian esperantan har-akiri.

Do la sonĝo de pastro Dabrowski, prezidinto de Esperanta Societo „Espero" en Petersburgo (kies fondinto kaj vicprezidinto mi havis la honoron esti antaŭ jaroj), tiu ĉi sonĝo efektiviĝas iom post iom, kvankam malproksime ankoraŭ estas la momento, kiam plenumiĝos entute la bela revo de l'poeto:

„Kaj pereos la plendado:
Mi vin ne komprenas, frato!"

Al plua laboro, al senĉesa batalo alvokas la pastro-poeto esperantajn apostolojn.

Kompreneble, ke mi, malgraŭvola skeptikulo, en la epoko de kreskanta malamo inter la nacioj kaj de renesanca barbareco, elreviĝinta el miaj junecaj revoj, — mi ne kuraĝos certigi vin, ke tiu ĉi idealo, varmiganta la korojn de esperantistoj, realiĝos iam entute.

La granda esperanta poeto, Antoni Grabowski, profetis iam:

„Jen etendiĝas antaŭ ni
En subĉiela sfero,
Revita nia Arkadi'
Kaj Promesita Tero."

Sed mi — tra larmoj kaj nuboj de reflektoj — preskaŭ ne vidas tiun ĉi Promesitan Teron. Kaj kune kun bonega esperanta poeto Stanislaw Braun, kies poemojn esperantajn mi ame tradukadis en polan lingvon, mi ofte pripensas la necertajn sortojn de nia esperanta ŝipo:

„Ofte de pensoj zorgoplenan aron
Flugila revo en estonton pelas
Post tiu ŝipo, elnaĝinta maron
De historio... Kien sortoj velas?
Ĉar koro volus levi jam kurtenon
De tiu Morgaŭ kaj vidi havenon!"

Kaj kune kun la poeto mi dronas en malgajaj reflektoj:

„Ĉu ni la firma el oro ĉenero,
En nefiniĝa de l'homaro ĉeno,
Ĉu nur de l'revoj flugilaj mistero
De efektivo kaj sonĝ' miskompreno,
Ĉu ni ĝerm' estas en plugita fendo,
Ĉu nur mirinda fabelo-legendo? ..."

Kaj iafoje la revo de Zamenhof pri disvastiĝo de Esperanto sub la standardo de paca misio prezentas sin al mi en karikatura bildo de sovaĝiĝinta homaro.

Jen, kiel turisto, mi alvenas al ia insulo sur ekzotika oceano. Aŭskultu... kaj tie oni parolas esperante: ia diktatoro de sovaĝuloj, sidanta ĉe bonodoranta kaldrono, invitas min al manĝo tre afable: „Bonan apetiton, sinjoro!" Do mi eksidas kaj demandas, kia estas hodiaŭa menuo? ... Kaj mi aŭdas la respondon: „Perfekta homaĵo! Manĝu, sinjoro!"

— — — — — — — —

Kaj tamen... ĉiufoje, kiam ni festas novan esperantan kongreson — en tiu ĉi preskaŭ neinterrompa vico de ĉiujaraj kongresoj (krom milittempo) — mia koro ree batas per ĝojiga espero. La karikaturo malaperas, mi aŭdas novan paŝon de venka marŝo de Esperanto!... Do ankaŭ hodiaŭ, kiam mi eksciis, ke en la centro de Eŭropo, en la sama Vieno, kie iam dum la politika kongreso la diplomatoj sub estreco de Metternich tranĉadis la naciojn en partojn, — ke nun sub estreco de respublikaj estraroj ariĝos la dudekokan fojon multaj gastoj el multaj nacioj por pacaj debatoj ĉe komuna fajrujo, kvazaŭ fratoj, interkompreniĝantaj bonege per unu lingvo — mi permesas al mi sendi al ili el Varsovio pere de la altŝatata Sinjoro Ministro de Aŭstrio la deziron: „Efektiviĝu la ora sonĝo de Zamenhof! Sanktiĝu la revo de genio de Esperanto!

XXVIII-UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN WIEN 1936

8-15. (15.-18.) AŬGUSTO.



XII-A SOMERA UNIVERSITATO

KULTURAJ KAJ EKONOMIAJ PROBLEMOJ DE MEZ-EŬROPO

INTERN. KONFERENCO DE VIRINOJ

VOJAĜO TRA AŬSTRIO

SALZBURG - WIEN - SEMMERING - GROSSGLOCKNER - SALZBURG

ĈARMAJ URBOJ - NEĜRAVITAJ MONTOJ - BLUAJ ALPOLAGOJ - DANUBO

FESTARANĜOJ

KOSTUMBALO: „LA KONGRESO DANCAS"

OPERETO: „LA BLANKA ĈEVALETO"

KONGRESEJO: LA FESTSALONEGOJ DE IMPERIESTRA KASTELO HOFBURG

ADRESO: ESPERANTO-KONGRESO-WIEN-NEUE BURG.

Protektoro:

Federacia Prezidanto de Aŭstrio.

Kongresejo: La salonegoj de iama imperiestra kastelo en Wien, Neue Burg.

Adreso: Esperanto, Wien, Hofburg.

Kongreskotizoj:

Favorkotizoj, validaj ĝis 15. de julio:

I. Kongresano sv. fr. 25.50.
II. Familiano de kongresano sv. fr. 16.—.
III. gejunuloj malpli ol 18-jaraj sv. fr. 10.80.

Kotizoj post 15. de julio:
I. sv. fr. 28.50, II. 17.75, III. 12.—.

Atentu, ke **ni ŝanĝis la rabatitan anoncdaton ĝis 15. de julio! Eluzu la tempon!**

Bonvolu bone atenti la kotizojn kaj pripensi, ke ili devos nete alveni en nian kason!

La koncernaj prezoj en **aŭstriaj ŝilingoj** estas: nun: I ŝ 44.80, II 28.20, III 19.—; post 15. de julio: I ŝ 49.90, II 31.10, III 22.75.

La prezoj estas transkalkulitaj en aŭstriaj ŝilingoj por tiuj, kiuj **deziras pagi en ŝilingoj.**

Kion devas scii fremda turisto, alvenanta al Vieno?

Dogan-imposto. En la rapidtrajnoj la dogana kontrolo okazas ĉe la limo rekte en la vagono. Liberaj de dogan-imposto estas aŭ objektoj por ĉiutaga uzado aŭ necesaj por plenumado de la profesio, krome nutraĵo por la vojaĝo kaj tabako: 10 cigaroj aŭ 50 cigaredoj aŭ 50 g da tabako.

Devizaj preskriboj. Aŭstrian monon kaj fremdan oni povas en ĉiu kvanto importi al Aŭstrio. Eksporto returne estas permesita por la aŭstria mono ĝis 200 ŝil., por fremda valuto ĝis la valoro de 500 ŝil. Pli grandajn sumojn oni povas eksporti sole en tiu kazo, se ĝi ĉe enveturo al Aŭstrio estis konfirmita en la pasporto aŭ se oni ricevis la permeson de Aŭstria Nacia Banko. Sur la bazo de tiu permeso oni povas eksporti plej multe 2000 ŝilingojn. Importo kaj eksporto de kredit-leteroj kaj ĉekoj estas tute libera.

Preskriboj pri policaj sin-anoncado en Aŭstrio. En Aŭstrio ekzistas neniaj specialaj

Noktigejo sur Grossglockner (2143 m) ĉe glaciejo.

preskribo j pri sin-anoncado ĉe polico por fremdlandanoj, ili estas same kiel la aŭstrianoj devigitaj plenigi la anonc-folion (Meldeblatt), kiun la posedantoj de loĝejoj (hoteloj, pensionoj, respektive luedonantoj) devas prezenti al la koncerna estraro. La tempo de restado en Aŭstrio ne estas limigita.

Trinkmono. En pli granda nombro de vienaj hoteloj oni alkalkulas je deziro de la gasto 15% kiel trinkmonon ĉe lia restado ĝis tri tagoj, ĉe pli longa restado 10% al la ĝenerala kalkulo.

Plivastigo de nia Somero Universitato.

La loka Kongresa Komitato ricevis de kelkaj kompetentaj flankoj la bone motivitan sugeston, **vastigi la kadron de nia Somera Universitato** limigita unue sole al pritrakto de ekonomiaj kaj kulturaj problemoj de Mez-Eŭropo, por doni al niaj eminentaj reprezentantoj la okazon, paroli en la Somera Universitato ĉu **en la intereso de ilia propra lando,** ĉu pri ia **problemo de nia lingvo kaj movado mem.**

La loka Kongresa Komitato akceptis tiun sugeston kaj atendas la anoncon de tiaj paroladoj.

Rumana E.-Societo informas nin, ke **Univers. prof. d-ro Grigore L. Trancu Iasi, iama ministro,** parolos en Somera Universitato.

Novaj fakaj kunsidoj:

Int. Ligo de Esp. Post- kaj Telegraf-oficistoj (ILEPTO): aranĝ. d-ro E. Spielmann, Bern, Gesellschaftsstraße 39. Merkrede, la 12. aŭg., je la 16 h.

Poŝtmarkkolektantoj: Adr.: Int. Esp.-Muzeo en Wien. Merkrede, la 12. aŭg., je la 10 h.

„Teknokratio kaj Etiko“, aranĝ. Felix Frankl, Wien, IV., Belvederegasse 9.

Skoltoj, adresu al LKK. de 28-a.

Karavano el Ĉeĥoslovakio:

Gusta adreso: Esp.-Asocio en ČSR, Turista komisiono, R. Bloch, Praha-Smichov 106.

Karavanon el Polujo prizorgas krom **Pollanda Esperanto Delegitaro en Kraków** (sekretario Kutscher) **Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo** (sekretariino Halina Weinstein) Varsovio, str. Leszno 99 m. 5.

Vojaĝo tra Aŭstrio (Ekskurso A):

Per komfortaj aŭtobusoj de Salzburg al Wien kaj de Wien al Salzburg aŭ de Wien (post la kongreso) al Salzburg trans Graz—Großglockner kaj reen al Wien (vidu la kongresgazetnumerojn!) kostas en sv. fr. 115.— (aŭ ŝ 200.—), en tre bona hotelo sv. fr. 124.— (aŭ ŝ 216.—), en pli simpla hotelo aŭ gastejo sv. fr. 110.— (aŭ ŝ 191.50).

Laŭ demandoj ni informas, ke ankaŭ povos partopreni personoj, kiuj **nur** deziras veturi: a) **de Salzburg al Wien** (5.—8. aŭg.) kaj b) **de Wien al Zell am See,** resp. **Salzburg** (15.—18. aŭg. vesp., sen noktigo, sed kun vespermanĝo). Ankaŭ al ili ni deziras servi, sed ni nur povas aranĝi la aferon jene, ke ni notu la anoncintojn por a) kaj b) kaj tuj informos ilin, ke ili povas partopreni. Ekz.: 7 danaj s-anoj deziras veturi en a) kaj ges. Ravestein en b) (3 pers.) do povas partopreni 3 danoj kaj ges. R. — Sed ili tuj devos sendi la koncernan sumon por la parto a) sv. fr. 57.30 (aŭ ŝ 99.70), **anstataŭ** sv. fr. 124.— en kateg. I kaj sv. fr. 52.— (aŭ ŝ 90.50), **anstataŭ** sv. fr. 115.— en kateg. II aŭ en b) sv. fr. 68.— (ŝ 118.30) en kateg. I kaj sv. fr. 64.70 (ŝ 112.50) en kateg. II.

Ni atentigas, ke nuntempe en Salzburg ne plu estas haveblaj ĉambroj pro la amas-sinanonco al la Festludoj, kiuj samtempe okazos en Salzburg. Ni rezervigis al ni aron da ĉambroj en Salzburg kaj en la proksima ĉirkaŭaĵo, kien ni veturigos la partoprenantojn per niaj aŭtobusoj por dormado.

Ni atentigas ankaŭ, ke ni **post la 15. de julio** ne plu povos akcepti ĉiujn mendintojn por la ekskurso A, tial ni petas baldaŭan aliĝon. Por ekskursoj B kaj la aliaj ni akceptos ĝis 31. de julio.

En ĉiuj kazoj la mono devos alveni samtempe, alie ni ne povos noti la partoprenon!

En ekskurso A vi **ne bezonas** partopreni. Se vi mendos la **ĉambrojn** pere de ni, jen la prezoj: De ŝ 3.80 ĝis 12.—, trinkmono enkalkulita. Krome en komunaj noktigejoj ŝ 1.60 kun matenmanĝo.

Manĝoprezoj por jenaj s-anoj, kiuj deziras mem aranĝi siajn aferojn, sed ili ne povas partopreni en la samaj komunaj manĝoj, aranĝataj de Turisma Servo:

matenmanĝo (kafo kun bulko)	ŝ —.70
tagmanĝo	de ŝ 1.50 ĝis 2.50
vespermanĝo	de ŝ 1.— ĝis 2.50

Atentu! En la provizora programo erare estis forgesite antaŭmeti la literon „T“ ĉe **vespermanĝo vendrede, la 14. de aŭg.** Tiu vespermanĝo **ne estas senpaga** por la simple aliĝintoj, sed enhavata en la ekskurso B.

6. listo.

639. Jeangirard Paul, stud., Paris.
640. Golobič Peter, instr., Jesenice-Fusi[na] Jugoslavujo.
641. Dopolavoro Ferroviario, Torino.
642. Popper Hugo, Böhm. Kamnitz, ČSR.
643. Murray John P. W., statistic., Barnto[n]
644. Murray Annie E., edz., Barnton, Sk[o]
645. Kent William, reg. ofic., Paisley, Sk[o]
646. Semple Florence Mackay, instr-in[o] Edinburgh.
647. Henderson Eliza, Edinburgh.
648. Groen Mary C., sekr., Ilford, Angl.
649. Munz Berhard, komerc., Salzburg.
650. Urbestraro de Boulogne sur Mer.
651. Magistrato de Boulogne sur Mer.
652. Gimbert-Marosie Angèle s-ino, Ven[ce] Franc.
653. Hantosch Elemer, ŝtatsekr. e. p. Budapest
654. Zilahy Lajos, verkisto, Budapest.
655. Cremers d-ro C. W. M., advok., Arnhem
656. Goedhart Maria Anna, instr-ino, Berg[en] op Zoom, Nederl.
657. Blom Maria, instr-ino, Heemstede, N[l]
658. Kirchner Aegid. Jos., prof., Lienz.
659. Génin Yvonne, lernejestrino, Vouziers
660. Coppo Madeleiner, studentino, Nice.
661. Roy Ernest, Blois, Franc.
662. Allgemeine Nährpflicht, Wien.
663. Umschaden Klotilde, Wien.
664. Samideanino el la malproksima N[e] Hindujo.

Kion nepre bezonas la kongresanoj:

Glumarkojn pri la kongreso en 5 koloroj, po 100 . . . . . aŭ. ŝ. 1[20]

Vidaĵkartojn de Wien (10 diversaj kun E.-teksto) pri la plej belaj lokoj . . . . . aŭ. ŝ. 1[20]

Vidaĵkartojn pri la plej belaj lokoj dum „Vojaĝo tra Aŭstrio“ (Salzburg, Ischl, Gmunden, Wels, Linz, Melk, Semmering, Rax-alpo, Graz, Baden, Pack, Klagenfurt, Spittal, Heiligenblut, Großglockner, Zell am See, 20 diversaj kun E.-teksto) aŭ. ŝ. 2[60] (jam riceveblaj en Salzburg je la komenco de la ekskurso A.).

Albumon de Wien kun detala priskriba teksto en Esperanto (24.5 je 16.5 cm) en bela kovraĵo kun proksimume 100 bildoj pri Wien en kupropreso . . . . . aŭ. ŝ. 27[0] Afranko aparte por la albumo kaj la vidaĵkartoj.

4 novaj donacoj al niaj kongresanoj!

1. **Oesterr. Verkehrswerbung** (Varboficejo de Ministerio por Komerco kaj Trafiko) eldonis nuntempe la naŭan jaron gvidilon en Esp. sub la titolo „Aŭstrio“, belega kovrilo kun getirolanoj, belegaj la multaj bildoj sur 32 paĝoj. Aldonita estas landkarto.
2. **Landa Oficejo por fremdultrafiko** en Karintio, Klagenfurt la unuan fojon aperigis E.-gvidilon, sed vere belan. Per bildoj oni montras al vi la belan landon; la grandioza landkarto montras detale al vi la vojon, kiun la vojaĝanto en ekskurso A faros, jam antaŭĝuo: Großglockner, Lago de Wörth, Klagenfurt.
3. **Klagenfurt,** la ĉefurbo de Karintio, inaŭguros **Esperanto-straton** okaze de la ĉi-jara Esp.-kongreso dum la posta vizito en Klagenfurt (ekskurso A), krome ĝi baldaŭ
4. eldonos **Esperanto-prospekton** pri la urbo kaj la Lago de Wörth.

Por la kongresanoj la 2 prospektoj estas aldonitaj.

Skribu al la urbestro „Bürgermeister, Klagenfurt, Aŭstrio“ dankleteron aŭ karton. Kontraŭ 1 resp. kup. estas riceveblaj la prospektoj de Aŭstrio, Karintio, Bruckneriando kaj Foiro Wien. LKK.

Mendu niajn belajn afiŝojn!

La libro **„Per aŭtobuso tra Aŭstrio kaj Wien“** aperos fine de junio kaj estas ege interesa por ĉiu partoprenanto en la ekskursoj, ĉar ili jam antaŭ la vojaĝo povos sin konatigi kun [la]



n Budapest, la ĉefurbo de Hungarujo, estas reparataj antaŭkongresaj tagoj (4.—8. aŭg.) j Postkongreso, subtenata de oficialaj stancoj (15.—18. de aŭg.). Kiu ne deziras rtopreni en la „Vojaĝo tra Aŭstrio“ kore as invitata veturi al Budapest, kaj travivi 3 belajn tagojn en la rondo de la gastamaj ngaraj samideanoj. Ni aranĝos eĉ por la urontoj al Budapest malmultekostan vetuon tien kaj reen per aŭtobuso aŭ S 38.—, sufiĉaj sin anoncos je 35 ĝis S 30.—. — Budapest la prezoj: en luksa kaj burĝa telo potage kun matena kafomanĝo 7—12 ngö, en unuaranga sanatorio 10—12 Pengö, privataj loĝejoj 3—5 Pengö, Manĝoprezoj 0—2.50 Pengö. Informojn donas LKK en ien.

havo. Kiu deziras ricevi la libron tuj post ero kaj ne nur dum la kongreso — ĝi estas enata en la kongreskotizo — postulu ĝin j postpagos la afrankon malgrandan.

Ni varbu ankaŭ inter **ne-esperantistoj,** r ke ankaŭ ili partoprenu nian Konreson kaj estu varbataj por nia movado! Uzu por propagando niajn belajn konresajn glumarkojn: 50 en 5 diversaj loroj por 1 respondkupono.

XVIII-a Intern. Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Brno,

ČSR, 4.—8. aŭg. 1936.

rotektoro: Lia ekscelenco d-ro Leopold reĉan, Moravia Metropolito.
Ĉiujn informojn volonte donas Aleŝ Berka, rez. de LKK, Brno, V. Jirchářich 8.
La kongreso finiĝos la 8. aŭg. matene kaj tuj oste la partoprenantoj veturos al 28. Univ. ong. al Wien.
LKK eldonis ses diversajn glumarkojn.

La Aŭstriaj Poŝtkartoj fine aperos!

La Aŭstria Poŝto ankoraŭ en junio elonos la promesitajn 50 vidaĵkartojn kun priskriba teksto en germana, angla, anca kaj Esperanto-lingvoj kun enpresita oŝtmarko je 35 g, la afranko por la sterlando!

Soseo trans Pack-alpo jus malfermita.

La 30. de majo en ĉeesto de la Fedecia Prezidanto de Aŭstrio, nia alta protoro, la soseo trans Pack (1075 m alta), n kreis novan mallongan interkomukadon inter la du ĉefurboj Graz en tirio kaj Klagenfurt en Karintio, estas oficiale malfermita. **Vi, kiuj partoprenos la ekskurson A,** ĝuos la belegan regionon, same kiel tiun trans Großglockner.

Festsemajnoj en Wien.

Kiel ĉiujare ili okazas en junio (nun de 7.—21.) kaj prezentas al la multnombra gastaro multvarian programon. Mendu informojn ĉe Fremdenverkehrsstelle, Wien, VII., Mariahilferstraße 2.

Universala Esperanto-Asocio.

Ĉu oni lasas morti pro sangoperdo vunditon aŭ ĉu oni atendas ĝis la Societo por Unua Helpo venos? Certe ne!

Ĉu la estraro de UEA, kiu sub tiel malfavoraj kondiĉoj de ĉiama deficito ĝis la preskaŭa morto de UEA transprenis la gravan taskon savi UEA kaj gvidi ĝin al pli bonaj cirkonstancoj, post la morto de dir. Kreuz, kiam la urĝa demando estiĝis „ĉu UEA pluvivu aŭ mortu!“, **havis la rajton** unue **demandi** la delegitojn en la tuta mondo, ĉu ili konsentu la nepre necesan operacion ŝanĝi la tutan organizon unue per **ŝparego** je la kostoj per translokigo de la Centro en pli malmultekostan Anglujon sub tie loĝanta sperta kaj kapabla dir. Goldsmith, per translokigo de la Biblioteko al la sole inda loko ĉe Nacia Biblioteko en Internacia Esperanto-Muzeo en Wien kiel aparta kolekto de UEA por eternaj tempoj, aŭ ĉu la estraro **havis la devon,** la moralan devon por Esperanto, **tuj decidi,** ĉar atendi kostis denove monon, kiun UEA ne posedas, ĉar la antaŭa reĝimo ĝin foruzis entute — la tutan grandan donacon de malavara Hodler?

La mono de Hodler estas for kaj ni havas la devon, daŭrigi la agadon de UEA, kaj, se Hodler nuntempe ankoraŭ vivus, li certe estus la unua, kiu konsentus la translokigon!

Nun oni venas kun la paragrafo de la statuto kaj per tio terure malutilas al UEA! La Estraro kaj unuavice ĝia prezidanto generalo Bastien tute precize konas la statutojn kaj ĝi nur — obeante la teruran necesecon — decidis, sed plenkonscie pri sia respondeco decidis, la unue aluditajn ŝanĝojn!

Nun komencas denove luktado per cirkuleroj, skribaĵoj, akuzoj, plendoj ktp.! Ĉu ni ne ankoraŭ sufiĉe suferis per tiaj luktadoj inter ni? Ĉu ni ne pli bone eluzu niajn fortojn batali por Esperanto kaj ne kontraŭ Esperanto?

Aperis: „Informilo pri UEA“, kiu konsterni kapablas la bonvolajn esperantistojn, kiuj deziras labori por E. trankvile sen ĉiam post kelka tempo revenantaj tiaj luktadoj!

El Nederlando venis cirkulero de la ĉefdel. Mooy kaj vicdel. Ravestein, en kiu ili informas, ke en Haagsche Post aperis artikolo, kiu enhavis jenan frazon: „La senspirita aŭtokrata reĝimo, inaŭgurita de s-ro Robert Kreuz kaj subtenata de kelkaj diktatoremaj personoj, malgraŭ streĉaj klopodegoj tute fiaskis, kaj nun, post la morto de s-ro Kreuz, oni staras ĉe la financa kaj morala ruiniĝo de la internacia organizo.“

Ĉu vi juĝas tian agadon taŭga helpi al la movado?

Ne necesas ĝustigi ambaŭ publikigaĵojn, ĉar nia prez. tute klare kaj precize skizis en sia cirkulero la nunan staton!

Radio-Wien:

Ĉiun merkredon Esp.-kurso de 18h 30 — 19h kaj je la fino „Informoj pri la 28-a“.

Vendrede, la 12. junio, je 22h 50 R. M. Frey „Memoro al Walter Smital“ kaj „Kongresa Vojaĝo tra Aŭstrio“ (Großglockner).

Vendrede, la 26. junio, je 22h 40 d-ro Emil Pfeffer „Somera Universitato en la kadro de nia 28-a“.

Vendrede, la 10. julio, je 22h 40 Nikolao Hovorka „Unua prezentado de Blank' Ĉeval' en Esp.“

Estu nur ankoraŭ aldonita letero, kiun skribis malnova pioniro dir. Schamanek, 77 jara, kiu vigle ankoraŭ partoprenas ĉiujn laborojn en nia movado kaj kiu sendis jenan leteron al la subskribintoj de „Informilo“:

Vortoj de Zamenhof en Krakovo:

„Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo.

Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. **Neniam** permesu, ke en nia afero regu la principo ‚kiu pli laŭte krias, tiu estas prava‘.

Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune.“

Intern. Esperanto-Muzeo en Wien
I., Neue Burg

P. J. Cameron, Honora visprez. de Londona Klubo Esp., Herts nonacis 10 angl. ŝ.; koran dankon.

Librodonacoj venis en majo de:
Japana Budhana Ligo Esp., Tokio,
Occidental-Union, Wien,
Giovanni Barni, Genova,
LKK de IX. Jugosl. E.-Kong., Ljubljana,
P. A. Pavlov, Harbin, Nordmanĉurio,
Förlagsföreningen, Stockholm,
Franz Ocelka, Wien (Volapük-libro 1888),
Sveda E.-Federacio, Stockholm,
Eduard Sykora, poŝtinsp., Wien,
Germana E.-Asocio, Dresden,
Klubo Esp. de Malmö, Malmö.

Teknokratio kaj Etiko.

La ampleksa programo de la 28-a Universla Esperanto-Kongreso en Vieno ankoraŭ riĉiĝas per kunsido pri „Teknokratio kaj Etiko“ iniciatata de la Viena Unuiĝo „Generala Nutrodevo“, kies tasko estas la diskonigo de la ideoj de la unua pioniro de l'moderna teknokratio kaj samtempe grava etikulo kaj filozofo Josefo Popper-Linkeŭs, kiu vivis, verkis kaj mortis en Vieno. —

Kiel konate, la teknokratoj pruvis, ke jam la nuna tekniko ebligus la ekonomian certigadon de la vivo de ĉiu homa individuo, kaj ke la evoluo de la homara ekonomio nepre devas sekvi la teknokratiajn socireformajn proponojn. — Tiuj ĉi ne estas utopiaj, sed bazitaj sur realaj, statistike atestitaj faktoj. — La teknokratio volas por ĉiuj homoj forigi la kruelan fantomon de la konstante revenantaj krizoj ekonomiaj.



Bad Gastein kun akvofalo.

Interesuloj, kiuj intencas partopreni tiun kunsidon, okazontan dum la kongreso en Vieno, merkrede la 12-an aŭgusto vespere, bonvolu sin tuj anonci skribe al s-ro Felix Frankl, Vieno, 4., Belvederegasse 9. — Detala programo ĝustatempe.

Walter Smital mortis.

Subite la morto forrabis Walter Smital en lia 44. jaro. Kiel militkaptito en Siberio li lernis Esperanton. Li post sia reveno multe laboris por E., estis prez. de E.-Del. de Wien kaj ĝen. sekr. de AEA kaj de IEMW; kunlaboris en la aŭstriaj kongresoj en Salzburg, Graz kaj Wien; estis komitatano de LKK de 16.-a Univ. Kong. Smital aranĝis bonege E.-ekspoziciojn en 1926 ĉe Herzmansky kaj en la pompsalonego de Nacia Biblioteko okaze de la inaŭguro de IEMW, dum kiu li majstre tradukis la diversajn paroladojn el E.-germanlingven kaj male. En 1925 li gvidis la 2-an E.-kurson en Radio-Wien kaj poste dum 7 jaroj estis preleganto tie. Smital helpis fondi Aŭstria Esperantisto-n kaj skribis multajn artikolojn kaj majstrajn recenzojn. Li havis bonegajn kapablojn kaj estis grandioza esperantisto. En la lastaj jaroj li ne plu iel laboris en aŭ por la movado.

Li ripozu en paco! AEA, IEMW

Ferio-vojaĝoj al Varna kaj Konstantinopolo.

Nia societo aranĝas ankaŭ ĉi-jare, same kiel en la pasintaj jaroj, por ĉiuj alireblajn ferio-vojaĝojn al Varna, la plej bela banloko ĉe Nigra Maro, kun ebla ekskurso al Istanbul (Konstantinopolo). La vojaĝo okazos sur Danubo per luksaj ekspresŝipoj, la loĝado estos en belaj du-litaj ĉambroj en privataj vilaoj proksime de la marbordo, abunda manĝado 3-foje dumtage en unuaranga apudmara restoracio. Forveturo el Wien: de 21. junio ĉiusemajne dimanĉe. — Vojaĝprezo Wien—Varna—Wien kaj restado en Varna (ĉio kune 2 semajnojn) aŭstriaj ŝil. 139.—, ĉiu plua semajno en Varna (loĝado kaj manĝado) 30 ŝil. Alpago por 4-taga ekskurso al Konstantinopolo 30 ŝil. Esperanta aŭ germana prospekto senpage. Detalojn kontraŭ respondkupono de: **Wiener Akademischer Esperantisten-Verein, Wien, I., Universität.**

El Tutmondo.

European Herald, London (E. C. 4, Fleet Street 54) grava kaj interesa ĵurnalo eldonata de **Kees Van Hoek** en la lingvoj angla, franca, germana, hispana, itala kaj Esperanto, represis en sia numero de la 9a de majo el nia gazeto la artikolon de **R. N. Coudenhove-Kalergi** „Danuba Federacio".

Aŭstrio: Oesterr. Reise- und Verkehrsnachrichten, eldonata de Ministerio de Komerco kaj Trafiko, publikigas inter la kongresoj ankaŭ nian 28-an.

Germana ŝlosilo ĵus aperis en nova eldono, post kiam dum 1 monato 5000 ekzempleroj estas forvenditaj. 5 pecoj afr. kontraŭ 1 resp. kup. de la eld. **Albrecht-Dürer-Verlag, Wien, VII.,** Bandgasse 28. Pli grandaj mendoj rabatitaj, sed nur alsendotaj post enpago.

Bulgarujo: „Danuba Federacio" de grafo Coudenhove-Kalergi, kiun ni aperigis kiel ĉefartikolon en la aprila n-ro de nia gazeto, aperis en bulgara traduko de sam. **D-ro Georgi pop Ivanov**, veterinaro en Orehovo (Bulg.), la 2an de majo en la Orehova ĵurnalo **„Pravda"**.

Pärnu, la plej bela ban-urbo en Estonio. Lukse eldonita, riĉe ilustrata, 12-paĝa gvidlibreto pri tiu kuracloko, konata pro siaj ŝlim-, marĉ- kaj marbanoj. — La bandirekcio eldonis ankaŭ tre belajn, kolorajn propagandajn glumarkojn en Esperanto. Ambaŭ senpage ĉe Ban-inspektoro en Pärnu, Estonio.

Francujo. Boulogne-sur-Mer. En la urbo de nia I-a Univ. Kongreso nova sukceso: Enkonduko de E. en la urba kolegio „A. Mariette". 50 lernantoj sekvas kurson de prof. Faire, sindona s-ano.

XIa Hispana Esperanto-Kongreso, en Barcelono, eldonis belajn mur-afiŝojn kun programo kaj ornamitajn per granda verda stelo sur nigra kaj flava fono, senpage ĉe Zamenhof-Instituto, Sitjas 3, Barcelona (Hispanujo).

Budapest, la metropolo de sanig-banejoj. 4-paĝa ilustrita prospekto en E. pri la radiumenhavaj sanigaj fontoj de Budapest. Senpage ricevebla de la „Centra Komitato de Termalbanejoj kaj Resanigejoj de Budapest", Budapest, Hungarlando, V., Vigado-placo 3.

S-ro **Kazuo Nonomura**, diplomito de Osaka Komerca Universitato, deziras korespondi kun aŭstriaj kaj germanlingvaj samideanoj pri kulturaj aferoj, muziko, belliteraturo, k, a. Li deziras ricevi leterojn skribitajn germana lingvo, li mem respondos Esperante. Adreso: Otori, Senhoku-gun, Osaka Japan.

Iom da konversacio.

Fervojo kaj hotelo.

Ĉu vi vojaĝas nun Vienon?
Kie mi ricevas la bileton?
Tie, ĉe la giĉeto numero dua.
(Mi petas bileton por)
Vieno, tria klaso, rapidtrajno.
Rapidu, la trajno tuj forveturos!
Daŭrigan bileton vi ricevos en la trajno ĉe la konduktoro.
Ĉu mi devas ŝanĝi la trajnon?
Ne, vi veturos rekte ĝis Wien.
Rondvojaĝan bileton vi ricevos en Aŭstria Trafikoficejo en Wien.
Ĉu mi devas pagi por mia pakaĵo?
Normala vojaĝpakaĵo, metebla sur la pakaĵejon super via sidloko, estas permesata.

Nur tre granda pakaĵo, ekspedata en la pakaĵvagono, kostas aparte.
Ĉu estas vagono por nefumantoj?
Mi petas, kie estas kupeo por nefumantoj?
Ĉu en tiu ĉi trajno estas restoracivagono?
Ĉu litvagono?
Kiel longe ni ankoraŭ veturos al Wien?
Wien, finstacio, ĉiuj eliru!
(Pakaĵ-) Portisto!
Prenu ĉi tiujn pakaĵojn.
Portu ilin al taksimetro!
Veturu al Hotelo...
Mi deziras ĉambron kun du litoj por unu semajno.
Mi petas, ne tro multekostan.
Kiom kostas la ĉambro?
Vi povas ricevi ĉambron en la tria etaĝo, lifto je via dispono.
Ĉu vi havas ĉambron kun fluanta akvo?
Forirante bonvolu doni la ŝlosilon de la ĉambro al la pordisto.
Kie estas poŝtoficejo?
Kie estas leterujo?
Kiel mi venas al la kongresejo en Neue Burg?

Kiun tramon mi uzu por ĉi tiu vojo?

Eisenbahn und Hotel.

Reisen Sie jetzt nach Wien?
Wo bekomme ich die Fahrkarte?
Dort, beim Schalter Nummer zwei.
(Bitte eine Fahrkarte nach)
Wien, dritte Klasse, Schnellzug.
Schnell, der Zug fährt gleich.
Anschlußkarte bekommen Sie im Zug beim Schaffner.
Muß ich umsteigen?
Nein, Sie fahren direkt bis Wien.
Rundreisekarte erhalten Sie im Oesterreichischen Verkehrsbureau in Wien.
Muß ich für mein Gepäck bezahlen?
Normales Reisegepäck, das Sie über Ihren Sitze im Gepäcksnetz unterbringen können, ist frei.
Nur sehr großes Gepäck, das im Gepäckwagen mitgeführt wird, ist gebührenpflichtig.
Gibt es einen Wagen für Nichtraucher?
Bitte, wo ist ein Raucherabteil?
Ist im Zuge ein Speisewagen?
Ein Schlafwagen?
Wie lange fahren wir noch bis Wien?
Wien, Endstation, alles aussteigen!
Träger!
Nehmen Sie dieses Gepäck.
Tragen Sie es zum Taxi!
Fahren Sie zum Hotel...
Ich wünsche ein Zimmer mit zwei Betten für eine Woche.
Ich bitte, nicht zu teuer.
Was kostet das Zimmer?
Sie können ein Zimmer im dritten Stock erhalten, Lift zu Ihrer Verfügung.
Haben Sie Zimmer mit fließendem Wasser?
Wenn Sie weggehen, bitte den Zimmerschlüssel beim Portier abzugeben.
Wo ist ein Postamt?
Wo ist ein Briefkasten?
Wie komme ich (in das Kongreßhaus) in die Neue Burg?
Welche Trambahn soll ich benützen?

Porhejmaj Taskoj.

Henriko la IVa kaj la vilaĝano.

Ĉe ĉaso Henriko la IV-a perdis la vojon kaj renkontinte vilaĝanon, lasis lin ascendi sian propran ĉevalon malantaŭe, por ke li montru vojon al l'arbarlimo.

Survoje la vilaĝano lin sciigis, ke li havas la deziron vidi la reĝon. „Ho, nenio estas pli facila", diras Henriko al li, „kiam ni alvenos al nia celo, ci ne devos fari ion alian ol rigardi tiun, kiu lasos la ĉapelon sur sia kapo dum la aliaj deprenos la siajn; tiu estas la reĝo. — Kvaronhoron poste Henriko realigis sian korteganaron kaj estis baldaŭ ĉirkaŭata de sinjoroj, kiuj salutis lin respektplene kaj restis kun malkovritaj kapoj. Li sin turnis al sia gvidanto kun la demando: „Kiu estas do la reĝo?" „Mi dubas, mia sinjoro", respondis la vilaĝano, „la reĝo estas aŭ vi aŭ mi, ĉar nur estas tie ĉi aliaj, nur ni du, kiuj havas la ĉapelon sur la kapo".

Universala Esperanto-Asocio
Ĉefdelegiteco por Aŭstrio
Wien, I., Neue Burg.

La **ĝenerala kunsido** de UEA okazos dum 28. Univ. Kong. en Wien, merkrede, la 12. de aŭg., je la 10 h. — Proponoj estas petataj.

Daŭrigo de la listo de la delegitoj: Rudolf v. Lidl, Salzburg. Vd. Erna Tillian, komercoficistino, Steyr.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803).

enerala kunveno de **Aŭstria Esperanto-Asocio.**

La ĝenerala kunveno de AEA okazos dum Univ. Kongreso en Wien vendrede, la aŭg. 1936, je 15 h 30 minutoj. La loko de nveno estos ankoraŭ ĝustatempe sciigita.

Provizora **tag-ordo:**

) Raportoj de estaranoj pri la asocia agado raporto pri la kas-ekzameno.
) nov-elekto de l'estraro.
) Programo pri la agadjaro 1936/7.
) Demandoj de l'aŭstria kaj internacia ovado.
) Eventualajoj.

ujn proponojn oni sendu al nia adreso fino de junio.

Kotizoj.

membroj estas petataj, enpagi la ankoraŭ agitajn kotizojn por la jaro 1936 plej frue ĝis fino de junio (ankaŭ en poŝtkoj.) Ŝ 2.—, senlaboruloj kaj familianoj .—.

daj reprezentejoj de AEA en la federaciaj landoj.

rom la ĝis nun nomitaj landaj reprezentoj: D-ro A. Karner por Tirolo kaj il Komposch por Karintio estas icigataj interkonsente kun la lokaj grupoj landa reprezentanto por Supra Aŭstrio: rl Franz, supera oficisto de l'urba ŝparo en Wels; por Salzburg: F. Laukes, numa sekretario en Lend.

onan varbolaboron faris denove la landa ezentejo por Tirolo: Dum la monato o aperis signifa serio da gazet-artikoloj E-aferoj en: „Tiroler Anzeiger", „Volksung Innsbruck", „Haller Lokal-Anzeiger", wazer Lokal-Anzeiger", „Kitzbüheler hrichten", „Neueste Zeitung" kaj „Vorerger Wacht".

un aperis „Cirkulera letero de l'landa ezentejo por Tirolo de AEA" sub la titolo: Tirola Esperantisto" kun sekvanta (germanva) enhavo: Por enkonduko, La 28a Univ. ngreso de E en Wien, La agado Buen-g, Propagandaj veturoj en Tirolo, E. en lo, E. en radio kaj sciigoj. Interesatoj as ricevi tiun cirkuleroj kaj ĉiajn informojn la movado en Tirolo ĉe la landa repretejo de AEA por Tirolo, d-ro Anton ner, Innsbruck, Hörtnaglsiedlung 37.

Jarlibro.

Ni intencas eldoni **la unuan fojon** en nia Aŭstria movado — jarlibron kun jarraporto kaj indiko de ĉiuj grupoj kaj membroj de nia Asocio. Klopodu, ke ĉi tiu jarlibro fariĝu dika atestanto de nia movado. Neniu grupo, neniu esperantisto en Aŭstrio manku en ĝi!

La libro estu dokumento pri la en Aŭstrio farita laboro kaj helpilo al alilandanoj, por trovi ĉe vojaĝoj en ĉiu loko samideanojn!

Ĉiu nia abonanto estu membro de Aŭstria E.-Asocio, pagante la malaltan jarkotizon kaj per tio ege subtenante la tutmondan kaj landan E.-movadon. **Ĉiu, kiu deziras la progreson de nia E.-movado,** ne hezitu kaj tuj fariĝu membro de **„la Landa Organizo de Aŭstrio AEA"!**

Sendu ĉiu grupo kaj ĉiu unuopa s-ano raporton pri la movado en sia regiono al ni **ĝis 25.** de ĉiu monato.

Helpantoj en la kongreso: Aro da s-anoj jam anonciĝis, sed ni bezonas ankoraŭ pliajn. Ili ricevos **senpagan** partoprenon en la kongreso kaj eĉ havos la eblecon pergajni kelkan monon. Temas pri: servado en la oficejo, en la stacidomoj (1 tagon), ĉe la kunsidoj, gvidado de kongresanoj dum ekskursoj kaj je aĉetadoj ktp. Interesuloj rapide anoncu sin; ili kunhelpos per tio al la bona sukceso! LKK.

Scherer-Vojaĝo.

Certe ĉiu memoras pri la granda vojaĝo de nia s-ano Joseph R. Scherer el Los-Angeles „ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo", kiun li entreprenis 1930—1932 per kaj por Esp.

Nun s-ano Scherer projektas novan vojaĝon. Post nelonge li alvenos al Eŭropo por proponi siajn talentojn (nun jam kiel **profesia prelegisto)** al la samideanaro en nia kontinento.

Li estos de la 1.—15. de aŭg. en Aŭstrio kaj partoprenos en nia 28-a. Do en la tempo de 1. ĝis inkl. 7. aŭg. li povos grandstile varbi por Esp. en la diversaj lokoj de Aŭstrio per siaj paroladoj. Niaj grupoj kaj unuopaj esperantistoj klopodu aranĝi la antaŭkondiĉojn por tiaj prelegoj kaj ili interrilatiĝu, por ebligi la paroladojn, kun lokaj neesperantistaj societoj.

La afero tre urĝas kaj ni petas, raporti al ni ĝis la 15. de junio, ĉu aranĝo estos ebla. Ni en Aŭstrio nepre devas ankaŭ aranĝi tiajn prelegojn, ĉar en ĉiuj aliaj landoj oni ilin preparas.



Lago de Wörth.

Detalojn vidu en Heroldo nro 14.

S-ro Scherer, prez. de E.-Asocio de Norda Ameriko, posedas kolekton de negativoj de 36.000 fotografajoj, mem faritaj en 47 landoj. Jam li faris 1000 prelegojn en 6 lingvoj. Pli ol 7000 mirindajn lumbildojn li posedas kaj havas aparaton por 2000 ĝis 3000 personoj.

2 specoj de paroladoj:

a) profesiaj paroladoj kun aŭ sen lumbildoj: 1. Pri la hejma vivo en naŭ landoj de Azio; 2. Pri „Romantika Hollywood"; 3. „Tra Usono kun ruliĝanta hejmo".

b) senpagaj paroladoj en E.-societoj, se ili aranĝis paroladon a).

Se vi gastigos s-anon Scherer, tiam la kostoj po parolado estas aŭ. Ŝ 50.—, se ne tiam 85.—.

Nepre eluzu ĉi tiun favoran ŝancon!

AEA.

Melk. Laŭ iniciato de s-ro Ehrenreich j., hotelestro ĉe la stacidomo, s-ano Lachmann el St. Pölten komencis kurson en Melk, kiun partoprenas 20 personoj. Grupo fondota de AEA. Dankon al la klopodoj de s-ano Ehrenreich kaj Lachmann.

Salzburg. La 15-an datrevenon de la grupfondiĝo festis krom la Salzburg-anoj ankaŭ aro da s-anoj el lando Salzburg, Supra Aŭstrio kaj Tirolo. En la bela gruphejmo gastejo „Schwarzes Rössel" f-ino Binder deklamis E.-prologon, verkitan de prof. Scheierl, poste prez. d-ro prof. Christanell faris la festparoladon pri la temo „Esperanto-propagando, Zamenhofa sento". Post la himno prez. Steiner salutis nome de UEA kaj AEA kaj alvokis al ega kunlaboro por eluzi la ŝancojn, kiujn donas la 28-a al nia lando. Sekvis s-anoj Franz

Komerc—Aŭstria.

Se vi deziras aĉeti varojn en Aŭstrio, skribu simple sub „Komerc-Aŭstria", Wien, I., Neue Burg, kaj ni helpos vin. Vi estos bone servata, se vi mem bezonos la varon, aŭ ricevos procentaĵon, se vi peros la negocon. (Vidu AE 5 pĝ: 7)

Ehrbar-fortepiano mondfama — **nobla sono** — solida Wien, I., Parkring 18 Tel. R-23-2-34	**Robert Knisch** Fabrikado de muzikiloj Wien I., Himmelpfortgasse 20	**Carl Ceschka & Söhne** ĉapelfabriko La ĉapelo „Esperanto" Wien VII., Kaiserstraße 123	**Löwy & Co.** Fabrikado de vestaĵbukoj kaj butonoj el artkorno Wien XVI., Römergasse 35
Model-produktado Adele Groß Vienaj maniaritaj trikaĵ-modeloj por sinjorinoj, sinjoroj kaj infanoj Wien, VI., Barnabitengasse 9	**„Esperanto-Sphinx"** kravato el unu peco de pura silko **ankaŭ kun la verda stelo** aŭ. Ŝ 8.50 en modaĵ-vendejoj, **sinjoro!**	**Edelmetallwerke A.-G.** antaŭe Wilhelm Tobias Wien, Aŭstrio, 13., Kuefsteing. 17—19 Fondita 1870 Specialaĵo: Fabrikado de laŭmoda ornamaĵo ĉiuspeca laŭ Viena artmetia stilo el latuno, alpako nikelumita, kromumita, arĝentumita kaj orumita.	**I. Blocksberg** Wien, VII., Neubaugasse 36 Fabrikado de oraĵoj kaj de unuarangaj belegaj pudrujoj kaj cigaredujoj el metalo.

el Weis, Laukes el Lend kaj del. von Lidl (Salzburg). Gefratoj Fohler kaj s-ano Riedl el Vöcklabruck aranĝis ĉarman gratulscenon, sekvis groteska „opero", verkita de prof. Scheierl, kaj kantita en Esp. de s-roj Stegmüller („Wilhelm Tell"), prof. Scheierl („Geßler"), kaj Thiel (policisto), kiu kaŭzis grandan gajecon. Dimanĉe, la 10. majo, je bela vetero vizito al la urbo. Al ĉiuj restos la belaj tagoj en Salzburg neforgeseblaj.

Esperanto-Klub Wien kunvenas ĉiun mardon de 18 h 30 — 21 h 30 en laktejo Wiener Molkerei, Prater Hauptallee 3. Venu s-anoj, vi sentos vin hejme!

E.-soc. Danubio, Wien: 8. 6. dir. F. Menacher „La hazardo en la mondhistorio", d-ro Mildwurf „Prag-Hradĉin kaj kastelo Karlstein"; 15. 6. d-ro Hans Ullrich „Studvojaĝo sur la veljahto Universitas al Greklando" (lumbildoj); 22. 6. Luise Ziwutschka „La glacimonto" (novelo); R. Čech „Kio nova en Esperantujo", Karl Kozina „Gramatikaj problemoj, Anton Denks „Humoro en E."

Ekskurso.

Esperanto-Klubo aranĝos la 14. de junio ekskurson al Knödelhütte, Sophienalpe, Steinriegel, Windischhütte, Weidlingbach, Neuwaldegg. Foriro je la 9 h de la finstacio de tramlinio 52 en Hütteldorf. Manĝajon kunprenu! Ĉiu esperantisto invitata!

Gvidado en Wien.

Esperanto-Klubo aranĝos la 5. de julio je la 9 h gvidadon tra Wien, klarigante la vidindajojn en Esperanto. Renkontejo je la 9 h Franz-Josefs-Kai ĉe Kafejo Siller. Partopreno senpaga, gastoj bonvenaj!

Geedziĝis la 31. de majo en Krems **Franz Stanke** kaj **Maria Krautzberger,** ambaŭ fidelaj esperantistoj!
Ni kore gratulas.

Mortis s-ano Anton Kluttig, ĉefinspekt. e. p. en Wien. La tero fariĝu al li malpeza!

Albrecht-Dürer-Verlag, Wien, VII., Bandgasse 28. Jus elvenis la nova eldono de la „germana ĵlosilo". La prezoj estas la samaj kiel anoncitaj en la januara numero de AE, sed la eld. informas nin, ke ĝi **nur** povas sendi **kontraŭ antaŭa enpago** de la prezo. Mendojn ankaŭ peras AE.

Wien, 3. kafejo en Prater. La posedanto, malnova s-ano Eugen Herndl invitas al vizito.

Kelkaj s-anoj kaj s-aninoj el Aŭstrio petas je **senpaga** akcepto **nur** por **noktigado** dum la kongreso. Bonvolu afable **tuj** informi nin, ĉu vi estas preta je ĉi tiu samideana helpo! LKK.

Recenzoj.

„Ich spreche Esperanto!" (Mi parolas Esperanton), enkonduko en la E.-konversacion, de d-ro Emil Pfeffer, jus aperis en 2. eld. en Tagblatt-Bibliothek, Wien.

Mallonga gramatiko kaj vortfarado de Esp. enkondukas la libreton kaj invitas tiel al ripetado de ili. Sur 56 paĝoj estas nun frazaro pri diversaj interesaj temoj el la ĉiutaga vivo en Esp. kun apuda traduko en la germanan lingvon. — — — La libreto, la prezo estas 52 g, vere estas bona helpilo por lernantoj sed ankaŭ por jam progresintoj. Por ekzercado tre rekomendinde. St.

Skriba Esperanto-kurso estas verkita de s-ano poŝtinspektoro Eduard Sykora, Poŝtoficejo Wien 82. Ĝi bonege enkondukas per 17 leteroj en la Esp.-lingvon. Pri kondiĉoj bonvolu rekte peti informon.

Normigo. Verkis Mikaelo Gitterman, membro de Futunia Normig-komitato de Konsilantaro de Laboro kaj defendo. Tradukis el rusa lingvo A. Samojlenko, lingve redaktis E. Drezen, teknika redaktoro K. Sidoroĉev. Eldonejo de „Ekrelo", presejo de „Mospoligraf", Moskvo, Ribinskaja n-ro 3. 16 paĝoj en grand-oktavo. — La nomita broŝuro traktas en tre klara kaj korekta lingvo interalie pri: esenco de normigo, mezurnormoj, normigo en Germanujo, Anglujo, Francujo kaj aliaj landoj, internacia normigo, normigo en Sovetunio, Tutunia normig-komitato, ekonomia profiteco de sovetuniaj normoj, propagando de la normo-ideoj k. t. p.

„De Deux Côtés du Détroit", monata organo de Franca Komerca Ĉambro en London, en angla kaj franca lingvoj, publikigas konstante ankaŭ **en Esperanto.** En la maja numero estas la artikolo „La Stahanovmovado ĉe la sovetiaj fervojoj", traktanta pri raciigo kaj inteŝivigo de la laboro ĉe la rusaj fervojoj.

Jubileumboek 1911—1936. Uitgave der Federatie van Arbeiders-Esperantisten in het gebiet van de nederlandse taal (eldono de Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la teritorio de la nederlanda lingvo). 160 paĝoj. Prezo 50 ned. cend.

Vere grandioza eldonaĵo laŭ aspekto kaj enhavo, pro kies aperigo la Nederlanda Laborista Federacio meritas specialan gratulon. En sistema vico preterŝoviĝas antaŭ la mirantaj okuloj de la leganto ekstreme interesaj artikoloj, pritraktantaj la historion de la ned. laborista movado. Sekvas artikoloj pri la praktika aplikado de E. en la servo de la laboristaro, pri la gazetara servo, kluba vivo, E. en Flandrujo, laboro inter la infanoj, E-ekzamenoj, E. en la presejoj, en la radio, en la lernejoj ktp., ktp. Abunda riĉeco de instruaj ilustraĵoj, agrabla preso sur luksa papero faras tiun ĉi libron ankoraŭ pli „jubilea" kaj oni povas preskaŭ envii la ned. E-laboristaron pro la eldono de tiu ĉi impresa kaj konvinka varbolibro.

Hvad er Esperanto? (Kio estas E?) Informa kaj propaganda broŝuro en dana lingvo. Verkis Dr. A. Goedecke. Eldonis Dansk Esperanto-Institut, Aabyhöj. 32 paĝoj da teksto kun aldonita l-a leciono de koresponda E-kurso.

„L'Infero." Redakcio: La Verdemularo, Sunjat-sen Universitato Kanton (Ĉinio).

Maŝinskribita, multobligita, 4-paĝa gazeto de la Ĉina esperantista studentaro. Ĉefa temo: la politika kaj ekonomia subjugado de la Ĉina popolo. Tendenco radikala. — La redakcio zorgu pri pli puraj matricoj kaj sekve pri pli granda legebleco de la bulteno.

„Zbliska i zdaleka" (De proksime kaj de fore) pollingva monata revuo dediĉita al geografio, landoj-kono kaj vojaĝado, alportas en lastaj numeroj artikolojn kaj notojn pri kaj por E. pri aŭstriaj poŝtkartoj kun E.-teksto, E. en la vivo de la junularo, „kiel tio estis en Japanujo". Adreso de la red.: Lwów, ul. Bourlanda 5.

R. Lechner, librovendejo, Wien, I., Graben, ekspozas en siaj elmontraj fenestroj E.-literaturon.

Deziras korespondi:

S-ro **Descamps** Roland, 59/6/I Rue St. Leu, **Amiens,** Franc. (Kongr. nro 635) pri la 28-a.

Lernantoj de „Esperanta fako de Escuela Natura", Calle Muncipio 12, **Barcelona** (Clot), Hispanujo, per poŝtkartoj.

S-o **Paul Van den Berghe,** ĵurnalisto kaj kunlaboranto de la plej gravaj ĵurnaloj en Belgujo, serĉas en la ĉefaj landoj korespondantajn E-istojn, kiuj tre bone konas la politikon de siaj respektivaj landoj, se eble ĵurnalistojn, kapablajn sendi regule t. e. ĉiusemajne interesajn artikolojn. Li mem kompense sendos al siaj korespondantoj la kopion de ĉiuj artikoloj, kiujn li ricevas aŭ ricevos de la aliaj korespondantoj. Li ricevas jam nun ĉiusemajne artikolojn el Francujo, Britujo, kaj Nederlando. 47, Avenue Jean Volders, Bruxelles, Belgujo.

Paŭlo Kalman, Budapest III, Pacsirtamezö u 35, III, 7, 28-jara muzikisto ĉe la orkestro tramista en Budapest, serĉas samideanon en Vieno aŭ proksime de ĝi, laŭeble perfektan esperantiston, por daŭra korespondado k reciproka gastigado dum la Viena E-kongres kaj poste dum la Esp-a Postkongreso, okazon en aŭgusto en Budapest.

Internaciaj Rondvojaĝoj Piediraj (memvo movado por ebligi al homgrupoj, britaj k aliaj, viziti fremdlandojn je kosto minimum Marŝante kaj pasigante la noktojn en simp loĝejoj, la homgrupoj tiel intime renkontas individuojn, el kiuj konsistas la popoloj de mondo. — Tiu internacia societo estiĝis Anglujo antaŭ sep jaroj, kiam miksita ana de angloj piediris tra Rejnlando, uzante „Junulgastejojn". El la sperto kaj spirito tiuj vojaĝintoj „Internaciaj Rondvojaĝ Piediraj" rapide kreskadis. Por tiu ĉi sezon staras sur la programo tuta serio da piedi kaj biciklaj vojaĝoj tra diversaj landoj de kontinento. Interesatoj postulu esperant prospekton de la hon. ĝen. sekretario: 6 Ba brigge Road, LEEDS 6, Anglujo.

Rekomendataj:

Cigaroj kaj cigaredoj de
Oesterreichische Tabakregie
famaj kaj preferataj en la tuta mondo p sia kvalito.

Nia oficiala kongresasekurejo „Der Anker Wien, I., Hoher Markt 10—11.

La ĉapelo **„Esperanto"** el la fabriko
Carl Ceschka & Söhne,
Wien, VII., Kaiserstraße 123.

La tramvojo al **„Pöstlingberg"** en Linz.

La termejo **„Warmbad Villach".**

„Aŭstria Festo je honoro de Bruckner" Linz - St. Florian, 18.—21. VII. 1936.

Bad Ischl, la plej frekventata salbanlok en Aŭstrio.

Hotel de France, Wien, I., Schottenring Tel. A-17-5-75. Unuaranga familia hotel

Venu ankaŭ vi al la fabele bela, m multekosta **Steiermark.**

KÖB, aŭtobusentrepreno de Oesterr. Bu desbahnen, Wien, II., Nordbahnstraße, No bahnhof.

Oesterr. Automobil-Fabriks-A.-G., anta „Austro-Fiat", Wien, XXI.

Ripozejo **„Maria Rast",** Schruns, Vora berg.

Schruns: Hotelo Taube-Post, pensio Edelweiß, kafejo Alpina, ŝpar-kaj pruntkas

Montafoner-fervojo Bludenz-Schruns.

Südbahn-Hotelo sur Semmering.

Ludkazinoj en Salzburg, Baden, Se mering.

Stiegelbräu, Salzburg.

Hotelo Feldmarschall Radetzky, Hint brühl.

Liechtenstein, la bela princlando, invit

Solvo de la enigmo el n-ro 5 a:

1. Paris, pario, parto, karto, korto, kon 2. Mars, maro, haro, horo, hoko; 3. Rust, ru muso, meso, meĉo.

La klišoj de Oesterr. Verkehrswerbung.

Eigentümer, Herausgeber und verantwortlicher Redakteur Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. Druck Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer" Wien, VII., Bandgasse 28.